# ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ◆ Esperantobladet ◆ kesäkuu ◆ junio ◆ 3/2018




◆ **Somera kurso 5.–9.6.2018 en Lahti, p. 4**

◆ **Nova babilejo por finnlandanoj, p. 10–12**

◆ **La internacia verkista konferenco de Lahti, p. 11**

# Esperantolehti

**Esperanta Finnlando ◆ Esperantobladet** ISSN: 0787-8206

Kielipoliittinen kulttuurilehti. Suomen Esperantoliitto ry:n äänenkannattaja.
Språkpolitisk kulturtidskrift. Organ för Esperantoförbundet i Finland.
Kultura periodaĵo lingvopolitika. Organo de Esperanto-Asocio de Finnlando.
Perustettu/Grundad/Fondita 1918. Esperantolehti ekde/från 1989 lähtien.
Esperanta Finnlando 1918–23, 1948–53, 1959–1987.
Ilmestyy viisi kertaa vuodessa. Utkommer fem gånger i året. Aperas kvinfoje jare.
Originajn tekstojn eblas reaperigi kun indiko de la fonto.
Alkuperäiset tekstit ovat uudelleen julkaistavissa lähdemaininnan kanssa.

**Toimitusryhmä/Redaktionsgrupp/Redakta grupo**: 💻 *eafgazeto@esperanto.fi*
Päätoimittaja/Chefredaktör/Ĉefredaktoro: *Robert Bogenschneider*
Rusthollintie 6 C 10, 28430 Pori 💻 *brilanto@gmail.com*
Taitto/Layout/Enpaĝigo: *Maj-Lis Krouvi* 💻 *maj-lis@maisanpaja.info*
Vastaava toimittaja/Ansvarig redaktör/Respondeca redaktoro: *Tuomo Grundström*

**Tilaushinta/Prenumerationspris/Abonprezo:** 25 €/vuosi/år/jaro
Jäsenhinnat: katso jäsenjärjestöt-sivu/ Por membroj: rigardu la antaŭlastan paĝon

**Tilaukset, osoitteenmuutokset/Abonoj, adresŝanĝoj:**
Suomen Esperantoliitto, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki.
☎ 044 264 2742 💻 *eaf@esperanto.fi*
**Prenumerationer, adressförändringar:** EAF, Broholmsgatan 15 C 65, 00530 Helsingfors.
**Pankkitili/Bankkonto:** FI82 5721 1520 2859 38 OKOYFIHH.

**Julkaisija/Utgivare/Eldonanto:** Suomen Esperantoliitto ry – Esperanto-Asocio de Finnlando.
**Painosmäärä/Upplaga/Eldonkvanto:** 300
**Kansi/Pärm/Kovrile:** Juhannusruusu Foto/Kuva: *Maj-Lis Krouvi*

## Esperanto-Asocio de Finnlando ◆ Suomen Esperantoliitto ry

Fondita/Perustettu/Grundad: 1907

**Prezidanto/Puheenjohtaja/Ordförande:** *Tuomo Grundström*
Anundilankatu 3, 26100 Rauma. ☎ 0440 199 766 💻 *eafprezidanto@esperanto.fi*
**Vicprezidanto/Varapuheenjohtaja/Vice ordförande:** *Päivi Saarinen*
Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 💻 *paivi.saarinen@iki.fi*
**Sekretario/Sihteeri/Sekreterare:** *Tiina Oittinen*
Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☎ 050 549 4709 💻 *eafsekretario@esperanto.fi*

**Aliaj estraranoj / Hallituksen muut jäsenet / Övriga styrelsemedlemmar:**
*Börje Eriksson*, Kulmakatu 10 A 6, 15140 Lahti. ☎ 040 779 3487 💻 *bovoeo73@gmail.com*
*Tiina Kosunen*, Viittakorpi 2 D 22, 02280 Espoo. ☎ 044 576 3314 💻 *tiina.kosunen945@gmail.com*
*Arja Kuhanen*, Saratie 2, 31300 Tammela. 💻 *kuhanenarja@gmail.com*
*Paula Niinikorpi*, Rusthollintie 6 as. 10, 28430 Pori. ☎ 040 527 4821 💻 *paula.niinikorpi@gmail.com*

**Vicestraranoj/Varajäsenet/Suppleanter:**
*Tapani Aarne*, Epilänkatu 41 E 7, 33270 Tampere. ☎ 050 524 5823 💻 *tapani.aarne@mbnet.fi*
*Anna Ritamäki-Sjöstrand,* Cedersvägen 10, AX-22100 Mariehamn. ☎ 050 379 3146
💻 *anna.ritamaki@kolumbus.fi*
*Miamaria Saastamoinen,* ☎ 050 32 89 612 💻 *miamaria.saastamoinen@gmail.com*

**Kasisto/Rahastonhoitaja/Kassör:** *Tiina Kosunen*
Viittakorpi 2 D 22, 02280 Espoo. ☎ 044 576 3314 💻 *eafkasisto@esperanto.fi*
**Pankkitili/Bankkonto (EAF):** FI82 5721 1520 2859 38 OKOYFIHH.

**Peranto de UEA / Maksut UEA:lle / Betalningar till UEA:** FI44 5630 4550 0426 25 OKOYFIHH
(UEA/EAF Paula Niinikorpi) Adreson vidu supre. / Katso osoite ylhäältä.

**Oficejo/Toimisto/Kontor:** Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, avoinna tiistaisin klo 17–19.
☎ 044 264 2742 (puh.vastaaja/respondilo). Malfermita: marde 17–19-a horo 💻 *eaf@esperanto.fi*

**Internet**: *www.esperanto.fi* ◆ *www.facebook.com/Finnlando* ◆ Twitter: @finnlando aŭ twitter.com/finnlando

# Kotirouvan sanavarasto ja muita huomioita



Joskus takavuosikymmeninä maailmaa kiersi ”tutkimustulos”, että yhdysvaltalaisten kotirouvien sanavarasto on vain kolmesataa tai viisisataa sanaa. Siitä saatiin päivittelynaihetta ”amerikkalaisten kulttuurittomuudesta ja pinnallisuudesta”.

Tuollainen tieto kuuluu tietenkin hupiosastolle. Jutunjuuri lienee kylläkin kaivettu ihan oikeasta kielitieteellisestä tutkimuksesta, tilastosta, joka määrittelee sanojen esiintyvyyttä, frekvenssisanakirjasta. Suomestakin on taajuussanakirja, Pauli Saukkosen ym. kymmenentuhannen sanan teos vuodelta 1978. Raimo Jussilan vuoden 1992 teos taas selvittää eri murteiden sanojen yleisyyttä. Niistäkin voisi leikata listaksi sata tai viisisataa yleisintä sanaa, jotka muodostavat arkipuheen leijonanosan. Niin voi amerikkalaistoimittaja olla tehnyt sentatessaan juttua kuriositeettipalstalleen.

Perheenemännän ei tarvinne arkitöissään käyttää aktiivisesti koko sanavarastoaan, niin kuin ei muittenkaan. Silti siinä arjessa voi olla kymmeniä asioita, joita jotkut muut eivät tunne eivätkä osaa nimetä.

Toisinaan tapaa sellaisiakin näkemyksiä, että jokin kieli olisi sinänsä edistyneempi tai muuten ilmaisuvoimaisempi kuin toinen. Sitäkin perustellaan sanavarastolla. ”Primitiivisestä” kielestä puuttuu esimerkiksi sellainen hallintotekninen sanasto, joka on välttämätön sopimusten laatimiseen – sen kielen puhujien on siis elettävä vieraskielisten sääntöjen mukaan. Sellaisesta tilanteesta lähtee kielenmenetys ja -vaihto. Sitä tapahtuu jatkuvasti, meillä ja muualla. Vasta parina viime vuosikymmenenä virallinen Suomi on tunnustanut muita äidinkieliä kuin suomen ja ruotsin ja alkanut tukea niitten elvyttämistä.

Ajatus kielten alkeellisuudesta tai edistyneisyydestä on mieletön. Se, että jossakin kielessä ei ole tekniikan sanastoa tai sille ei ole kirjoitettu lakipykäliä tai että sillä ei ole kirjoitusjärjestelmääkään, ei kerro kielen kehittyneisyydestä eikä sen ilmaisuvaroista mitään. Sellaiset asiat kertovat kielen käyttäjien asemasta, siitä miten ja missä he elävät. Suomen puhujien asema on muuttunut tuolla lailla kahdessa vuosisadassa (ja samalla Suomenkin alkuperäisvähemmistöjen asema edellisessä kappaleessa kuvalla lailla).

Oletus kielten keskinäisestä etevämmyydestä ei kestä minkäänlaista tieteellistä eikä eettistä tarkastelua. Suomeksi ei vielä sataseitsemänkymmentä vuotta sitten ollut olemassa paljonkaan kirjallisuutta, eikä sanoja mutkikkaisiin uusiin käsitteisiin ollut. Se kahlitsi maarahvaan niin henkistä kuin aineellista vapautta. Oli yleisesti sellaisia mielipiteitä, ettei maarahvas primitiivisellä kielellään pystykään luomaan omaehtoista sivistystä ja talouselämää, että sillä ei ole sellaista kollektiivista kykyä; enintään yksilötason säätykiertoa voisi esiintyä. Niin ei ollut, ja kansa loi kahleensa omin sanoin. Samoja vaiheita on sittemmin eletty ja eletään parhaillaan eri puolilla maailmaa.

Toisinaan kuulee kysymyksen, mitä kieliä arvostat. Vastauksena on usein englannit ja ranskat, saksat ja venäjät, joita käytetään kansainvälisinä apukielinä; parempana vastauksena oma äidinkieli, ajattelun koti; mutta ”oikea” vastaus on kaikki kielet. Ei niitä voi asettaa arvojärjestykseen. Kieliä voi kuvata, mutta ei määritellä ”eteviksi” eikä arvottaa: sehän olisi eräänlaista rasismia.

Esperantoakaan ei kielten joukossa voi arvottaa. Sillä on ominaisuutensa, joiden ansiosta se on helppo omaksua ja käyttää, ja tehtävänsä, joka on olla aidosti ihmiskunnan yhteinen, rajoja reilusti, tasa-arvoisesti ylittävä. Ihmiskunnan ei kuulu olla jaettu etuoikeutettuihin ja maarahvaaseen, kielellisestikään.

*Tuomo Grundström*



Fotoj: Tiina Oittinen.

# Somera kurso 5.–9.6.2018 en Lahti

La Somera kurso de EAF kaj ELFI aranĝita ĉijare kunlabore kun loka Wellamo-instituto en Lahti okazis en bonhumora etoso. Post la varmega majo nin trafis la malpli varma junio, sed tio ne malhelpis la studadon. Kunestis 12 kursanoj kaj krome partoprenis en la instruado ankaŭ la 4 ĉiĉeronoj el la regiono de Lahti, kiu nun povis la unuan fojon praktiki gvidadon por esperantlingva grupo, plej ofte tamen kun interpretado.

Nia eksterlanda instruisto, *Nina Pietuchowska* el Pollando, bone sukcesis instigi la kursanojn al babilado kiam ŝi donis al ili la plej diversajn, ofte eĉ komplikajn kaj enigmajn taskojn. *Sylvia Hämäläinen* instruis uzante la finnan kaj ankaŭ en ŝia grupo la celo estis parolado. Oni aŭdis multfoje ridegon el la klasĉambroj, do certe la kursanoj bone amuziĝis.

La kursanojn helpis en praktikaĵoj kursorespondeculo *Tiina Oittinen* kaj kursoestro *Börje Eriksson*, kiuj partoprenis la kursosemajnon. Ili krome havis tempon por preparaj laboroj de la venontjara Universala Kongreso: okazis kunvenoj kun oficistoj de *Lahti Region* (ĉeestis ankaŭ *Päivi Saarinen* kaj *Tiina Kosunen* el EAF) kaj intervjuoj kaj por radio, loka redaktejo de YLE, kaj por ĉefa loka taga ĵurnalo *Etelä-Suomen Sanomat*. Redaktoro de Finna-Pola asocia gazeto intervjuis Ninan vendrede.

Dum la kurso ni vizitis ĉefajn lokojn en la centro de Lahti: la urbodomon, la preĝejon kaj la havenon kun apudaj parkoj. Kaj nature ni vidis la grandajn skisaltejojn kaj de ekstere *Isku Areena* halon, la estontan kongresejon. Ĵaŭde vespere ni estis invititaj por vesperumo ĉe kantelisto *Timo Väänänen* en lia hejmo, kie ni ĝuis koncerton en mirinda, eĉ magia etoso. Timo ludis lerte diversgrandajn kantelojn kaj rakontis



al ni pri ilia historio. Ankaŭ la vespermanĝo preparita por ni treege bongustis. Elkoran dankon al Timo.
Estis afable, ke la kursotagojn kaj vesperumon povis viziti esperantistoj, kiuj riĉiĝis nian semajnon. Tio estis ankaŭ praktike, ĉar ni povis jam komenci preparadon de la kongresa jaro.
Pro la kursoaranĝado ni diras koran dankon ankaŭ al *Anja Kivivuori* el la instituto *Wellamo-opisto*. Ĉio iris glate kaj la deĵorantaj oficistoj ĉiam estis pretaj helpi en niaj diversaj petoj. Ankaŭ estis bone, ke la kafejo de la domo estis malfermita kaj eĉ servis lunĉon dum la kursosemajno.
En la septembra numero ni esperas havi pliajn rakontojn kaj spertojn de la partoprenantoj pri la ĉi-jara somera kurso. Venontjare ni eble denove havos la kurson en Lahti, verŝajne kiel parto de trejnseminario. Ĉiokaze ĝis la revido en Lahti!

*Raportis*
*Tiina Oittinen*

# La internacia vojo Esperanto

Naciaj aŭ internaciaj vojoj, tra la mondo, ekzistas multaj famaj vojoj:

- la Vojo *Sankta Jakobo de Kompostelo* estas konata por pilmigradi,
- la Vojo 66 por trairi Usonon de oriento ĝis okcidento (3945 km) motorbicikle,
- la Vojo *Rikardo Leonkoro* (fama batalanto) por viziti kulturan kaj artistan heredaĵon,
- la franca Nacia Vojo 7 pro sia beleco,
- la Vojo *Via Domitia* kiel unua vojo ligante la Alpojn kun la Pireneoj.

Do, pro diversaj kialoj, kelkaj vojoj estas tre konataj. Mia ideo estas krei la internacian vojon Esperanto danke al ZEO-j [Zamenhof-Objektoj].

Sed ĉu vi konas ”ZEO-n 1”? ZEO-j ekzistas delonge sed, laŭ mi, ili ne estas sufiĉe konataj, bedaŭrinde. Do, mi deziras inviti vin pripensi tion kune: kiel valorigi ZEO-jn por krei la internacian vojon Esperanto?

Eble ni povus publikigi libretojn kun ĉiuj ZEO-j de la Mondo kaj fari pasporton, kiu estus subskribita de la turismaj oficejoj aŭ la urbodomoj? Tiel la vojaĝantoj havus belegajn memoraĵojn de siaj vojaĝoj kaj Esperanto estu pli konata en la institucioj.

Ĉu vi havas aliajn ideojn?

Por pli da informoj bv. respondi rekte al
s-ino *Isabelle NICOLAS*,
*isabelle.nicolas2@gmail.com*
tel. 0033-6.70.58.61.19

# Aŭtunaj Tagoj kaj Trejnseminario Syyspäivät ja kongressiseminaari 14.–16.9.2018

Feriejo: Lomakeskus Lepola, Lahti, adreso: Sipurantie 32

## PROGRAMO – OHJELMA

(ŝanĝoj eblas – muutokset mahdollisia)

VENDREDO *PERJANTAI* 14.9.2018

**10.30** Alveno en Lahti Matkakeskus, de kie transporto al Isku Areena (per propraj aŭtoj eblas veturi rekte tien). *Saapuminen Lahden Matkakeskukseen, josta bussikuljetus Isku Areenalle (omalla autolla voi ajaa suoraan Areenan parkkipaikalle).*

**10.45–12.15** Rondveturo en Lahti. *Kiertoajelu Lahdessa.*

**12.30–13.30** Lunĉo en restoracio de Isku Areena. *Lounas Isku Areenan Lämäri-ravintolassa.*

**13.30–14.30** Konatiĝo en Isku Areena. *Tutustuminen Isku Areenaan*

**14.30** Ekveturo per propraj aŭtoj aŭ per loka buso al Feriejo Lepola. *Siirtyminen Areenalta Lomakeskus Lepolaan (kimppakyydein tai Lahden paikallisbussilla).*

**15.00** Enloĝiĝo kaj tuj poste trejnseminario. *Majoittumisen jälkeen aloitetaan kongressiseminaari.*

**16.30** Kafo. *Kahvit.*

**17.00** Trejnseminario daŭras. *Kongressiseminaari jatkuu.*

**19.30** Vespermanĝo kaj libera kunestado. Eblo saŭnumi. *Iltaruoka ja vapaata yhdessäoloa. Saunomismahdollisuus.*

Kunsido de la estraro de EAF/LKK.

SABATO *LAUANTAI* 15.9.2018

**8.00–9.00** Matenmanĝo. *Aamiainen.*

**9.00–10.00** Veturo per publikaj busoj aŭ per propraj aŭtoj en Lahti. *Siirtyminen Lahteen kimppakyydein tai paikallisbussilla.*

**10.00–12.00** Filmo *Skiŝpuro de amo*, kinejo *Iiris*. *Elokuva Lemmenlatu kino Iiriksessä*. adreso/osoite: *Saimaankatu 12* en centro de Lahti

**12.30–13.30** Lunĉo. *Lounas.*

**13.30** Vizito en arta muzeo de Lahti kaj en aŭlo de la urba teatro. *Vierailu Lahden taidemuseossa, matkalla käynti Lahden kaupunginteatterin aulassa.*

**15.30** Reen al Lepola per publikaj busoj aŭ per propraj aŭtoj. *Takaisin Lepolaan kimppakyydein tai paikallisbussilla.*

**16.00** Trejnseminario daŭras. *Kongressiseminaari jatkuu.*

**17.30** Saŭnoj varmaj. *Saunat lämpiminä.*

**19.00–21.30** Vespermanĝo kaj vesperumo. *Iltaruoka ja illanvietto.*

DIMANĈO *SUNNUNTAI* 16.9.2018

**8.00–9.30** Matenmanĝo. *Aamiainen.*

**9.30–12.30** Konkludo de trejnseminario. *Kongressiseminaarin yhteenveto.*

**12.30–13.30** Lunĉo. *Lounas.*

Fino de la AT kaj seminario. Ekveturo hejmen. *Päätössanat ja kotiinlähtö.*

Bonan hejmvojaĝon! *Hyvää kotimatkaa!*

Bonvenon! – *Tervetuloa!*




**Kuva: www.lomakeskuslepola.fi**

Ĉar alproksimiĝas la 104-a Universala Kongreso, Aŭtunaj Tagoj estas kombinitaj kun la dua Trejnseminario kaj nature aranĝitaj en Lahti. Certe ĉiuj esperantistoj en de la lando scivolemas kaj interesiĝas pri la estonta kongresurbo kaj kongresejo, kvankam ankoraŭ ne aliĝis kiel kongresaj volontuloj. Partoprenado en Aŭtunaj Tagoj ebligas tion kaj ni en EAF-estraro deziras, ke tio instigas ĉiujn laŭ siaj fortoj kunlabori por okazigi perfektan kongreson al kio ni en Finnlando alkutimiĝis.

Aŭtunaj Tagoj komenciĝas per rondveturo en Lahti. Nin gvidos niaj lokaj ĉiĉeronoj, kiuj jam dum la somera kurso ekzercis ĉiĉeronadon por nia internacia rondo. Post tio ni konatiĝos en la ĉefa kongresejo, *Isku Areena* -halo, kaj havos unue lunĉon tie. Krom la respondeculoj de la *Areena* kun ni estos la kunlaborantaj oficistoj el turisma organizo *Lahti Region*. Ili partoprenos la Lisbonan kongreson ĉi-somere kaj ni nature scivolemas pri ilia spertoj tie.

La trejnseminario okazos en feriejo *Lomakeskus Lepola*, kien ni veturos tuj post la vizito de la kongresejo. En septembro ni jam scias pli multe pri konkretaj aferoj de la kongresaranĝoj kaj povas vere komenci la praktikan laboron.

Sabate ni reenveturos al Lahti por spekti filmon *Lemmenlatu* (Skiŝpuro de amo), kiu estas rakonto pri la pli ol 110- jara historio de la urbo Lahti (legu pli sur paĝo 10). Lunĉon ni havos en la urbo kaj post tio niaj ĉiĉeronoj gvidos nin en

# ALIĜILO

Mi aliĝas al la Aŭtunaj Tagoj de EAF
14.–16.9.2018 en Lahti.

**Nomo**: ______________________________

**Adreso**: ______________________________

**Tel./Ret-adreso**: ______________________

______________________________________

**Aliĝkotizo** (enhavas 2 tranoktojn en 2-lita ĉambro, rondveturon kaj manĝojn laŭ la programo):

50 € ĝis........................................10.8.2018 ____

60 € post......................................10.8.2018 ____

Transportoj:
Matkakeskus - Isku Areena vendrede (per rondvetura buso)
Isku Areena - Lepola vendrede (propraj aŭtoj aŭ lokaj busoj)
Lepola - Lahti - Lepola sabate (propraj aŭtoj aŭ lokaj busoj)
Lepola - Lahti dimanĉe (propraj aŭtoj aŭ lokaj busoj)

Mi veturas al Lahti per trajno aŭ buso kaj bezonas transporton aŭ helpon kiel uzi lokajn busojn:
alventempo (tago kaj horo): ________________
ekveturtempo (tago kaj horo): ______________
Mi pretas transporti aliajn per mia aŭto: ________

**Entute pagenda al la konto de EAF**: _________
**Pagoj al la konto:**
**FI82 5721 1520 2859 38 OKOYFIHH**

Bv. uzi la AT-referencnumeron **4640 (ne skribu aliajn informojn en la pagilo)**.

**Pliaj informoj aŭ deziroj aŭ demandoj**, ekz. specialaj dietoj aŭ 1-lita ĉambro (vi povas demandi ankaŭ rekte de la kontaktuloj):

______________________________________

______________________________________

______________________________________

Bonvolu prefebleble aliĝi al la retadreso:
*eafmendoj@esperanto.fi*
La paperan aliĝilon bonvolu sendi al:
Esperanto-Asocio de Finnlando
Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki

**BONVENON!**

# ILMOITTAUTUMISLOMAKE

Ilmoittaudun Suomen Esperantoliiton syyspäiville 14.–16.9.2018 Lahdessa.

**Nimi**: ______________________________

**Osoite**: ______________________________

**Puh./sähköposti**: ______________________

______________________________________

**Ilmoittautumismaksu** (sis. 2 yötä 2-hengen huoneessa, kiertoajelun ja ohjelman mukaiset ruokailut):

50 €.................................... 10.8.2018 asti ____

60 €................................10.8.2018 jälkeen ____

Kuljetukset:
Matkakeskus - Isku Areena perjantaina (kiertoajelubussi)
Isku Areena - Lepola perj. (kimppakyyti tai paikallisliikenne)
Lepola - Lahti - Lepola lauant. (kimppakyyti tai paikallisliikenne)
Lepola - Lahti sunn. (kimppakyyti tai paikallisliikenne)

Matkustan Lahteen junalla tai bussilla ja tarvitsen kuljetuksen tai ohjeet paikallisbussia varten:
saapuminen (pvm, klo): ____________________
lähtö (pvm, klo): _________________________
Voin kuljettaa muita autollani: ______________

**Maksut yhteensä**
**Suomen Esperantoliiton tilille**: _________
**Tilinumero:**
**FI82 5721 1520 2859 38 OKOYFIHH**

Käytä viitenumeroa **4640 (ei muita tietoja viite- tai viestikenttään maksun yhteydessä)**.

**Lisätietoja, kysymyksiä ja/tai toivomuksia,** esim. erikoisruokavaliot, 1 hh
(voit kysyä myös suoraan yhteyshenkilöiltä):

______________________________________

______________________________________

______________________________________

Lähetä tiedot sähköpostitse:
*eafmendoj@esperanto.fi*
tai lomake osoitteella: Suomen Esperantoliitto
Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki

**TERVETULOA!**



**Venontaj**

la loka Arta muzeo. Post la urba ekskurso ni revenos al *Lepola* kaj daŭrigas la trejnseminarion. Fine de la tago ni havos komunan vesperumon, eble kun artaj kontribuoj.

Bonvenon al Lahti por konatiĝi en la kongresaj ejoj kaj por lerni pli de kongresaj aranĝoj en la trejnseminario! La aliĝkotizo estas malalta, ĉar EAF ricevis subtenon de FES por aranĝado de trejnseminario.

*Lahdessa ensi vuonna järjestettävä 104. Esperanton maailmankongressi lähestyy kovaa vauhtia. Niinpä Esperantoliiton perinteiset syyspäivät pidetään kongressiseminaarin merkeissä Lahdessa. Tutustumme Lahteen kiertoajelun ja museokäynnin merkeissä ja näemme myös kaupungin historiasta kertovan filmin nimeltä Lemmenlatu (lue lisää sivulta 10). Kierrämme myös kongressipaikka Isku Areenan tilat ja syömme lounaan sen Lämäri-ravintolassa.*

*Kongressiseminaari pidetään Lomakeskus Lepolassa, noin 11 km päässä Lahden keskustasta, jonne pääsee myös Lahden paikallisbusseilla. Syyskuussa tiedämme jo paljon enemmän kongressijärjestelyistä ja kuulemme myös Lissabonin kongressissa olleiden kokemuksia. Lahti Regionin ja Isku Areenan henkilöitä lähtee myös Portugaliin ja on mukava kuulla heidän kertomuksiaan matkasta.*

*Syyspäivät ja kongressiseminaari ovat tarkoitetut kaikille liiton jäsenille, ei vain niille jotka ilmoittautuvat vapaaehtoisiksi kongressiavustajiksi. Tule mukaan tutustumaan tulevaan kongressikaupunkiin ja osallistumaan voimiesi ja kykyjesi mukaan kongressijärjestelyihin. Seminaarikuluihin olemme saaneet avustusta Fondumo Esperanto -säätiöltä, siksi osallistumismaksu on alhainen.*

*Ni faru kune neforgeseblan kongreson - denove!*

*Tehdään taas Suomeen unohtumaton kongressi - yhdessä!*

*Estraro de EAF, Esperantoliiton hallitus*

# Aliĝinformoj

Aliĝu sendante viajn informojn retpoŝte al la adreso *eafmendoj@esperanto.fi*. Ni preferas la aliĝon rete, sed eblas ankaŭ sendi per poŝto la apudan aliĝilon al la oficejo de EAF. Krome pagu la koncernajn pagojn al la konto de EAF. Memoru uzi referencnumeron sen indikante temon de la pago. Notu, ke nura pago ne sufiĉas, ni atendas viajn informojn, prefere per retpoŝto. Tre gravas scii, kiam vi venos kaj ĉu vi pretas veturigi aliajn per via aŭto. Antaŭdankon!

Kun viaj eventualaj demandoj kaj deziroj, bonvolu turni vin al Tiina Oittinen (transportoj, manĝoj, tranoktoj). De Börje Eriksson vi povos demandi pri lokaj aferoj (distancoj, itineroj ktp). Pagojn sekvas la kasisto Tiina Kosunen. Ĉiuj estas funkciuloj de EAF kaj vi trovas la kontaktoinformojn sur la pago 2.

Se pro iu kialo okazos ŝanĝoj en viaj planoj, informu la kontaktulojn per telefono aŭ retpoŝte, bonvolu ne lasi scion en la oficeja telefonrespondilo.

# Ilmoittautuminen

*Ilmoittaudu lähettämällä tiedot sähköpostilla osoitteeseen eafmendoj@esperanto.fi sekä maksamalla vastaavat maksut liiton tilille. Halutessasi voit myös lähettää lomakkeen postitse Suomen Esperantoliittoon. Muista käyttää viitenumeroa, jonka kanssa ei pidä kirjoittaa muita viite- tai viestitietoja. Huomaa, että pelkkä maksun lähettäminen ei riitä, sillä odotamme myös tietoja siitä, miten olet osallistumassa. Toivomme erityisesti ilmoitusta siitä, milloin tulet ja voitko mahdollisesti kuljettaa muita autollasi. Kiitos jo etukäteen!*

*Kysymyksiin ja/tai toivomuksiin vastaavat liiton toimihenkilöt seuraavasti: Tiina Oittinen (kuljetukset, ruokailut, yöpymiset), Börje Eriksson (paikalliset asiat) ja Tiina Kosunen (maksuasiat). Kaikkien yhteystiedot ovat lehden sivulla 2.*

*Huomaa, että jos suunnitelmiisi tulee viime hetken muutos, ilmoita yhteyshenkilöille joko puhelimella tai sähköpostilla. Liiton toimistossa Helsingissä on päivystäjä vain tiistaisin ja toimiston puhelimeen jätetyt viestit saattavat välittyä myöhässä.*

## Esperanto-societo Antaŭen informas

Someraj renkontiĝoj okazos en la kafejo de la ĉefbiblioteko ”Metso” en Tampere lunde je la 17–18 (28.5. – 27.8.).

- 3.9. je la 17.00 Septembra vespero
- 12.9. je la 11.30–13.00 Esperanto-klubo
- 8.10. je la 17.00 Oktobra vespero
- 5.11. je la 17.00 Novembra vespero
- 19.11. je la 17.00 Elektokunveno
- 10.12. je la 17.00 Zamenhof-vespero

Iun antaŭen-anon vi renkontas en Nesto, nia klubejo, ĉiujn lundojn je la 16–17.
Pliajn informojn vi trovas ĉe la retejo: *www.esperanto.fi/grupoj/tampere/programo/*

*Bonvenon! Estraro*

# Lemmenlatu – tarina Lahden yli 110-vuotisesta historiasta

*Kaksituntisen elokuvan nimi viittaa Lemmenladuksi kutsuttuun lahtelaiseen hiihtolatuun. Se oli Suomen ensimmäinen valaistu latu.*

*Lemmenlatu on mittavin Lahdesta koskaan tehty dokumenttielokuva (osittain dramatisoitu). Lemmenlatu kertoo kaupungin yli 110-vuotisen historian aina perustamisvuodesta 1905 lähtien. Käsitellyksi tulevat Lahden teollisuuden ja kaupankäynnin kehitys, koulutus, urheilun merkkihetket Salpausselän kisoineen, radiomastot sekä monipuolinen kulttuurielämä teatterista konsertteihin ja museoihin.*

*Idea Lahden historiaa käsittelevästä Lemmenlatu-elokuvasta tuli Keijo Skipparilta. Hänen kanssaan projektiin lähti ohjaaja Tertta Saarikko (edesmenneen SDPn poliitikon Jouko Skinnarin leski). Käsikirjoitusryhmään kuuluu muun muassa dekkarikirjailija Timo Sandberg.*

*Lahdessa kuvatun elokuvan on tuottanut Päijät-Hämeen Elokuvakeskus. Kuvamateriaalia on hankittu useista lähteistä: Lahden museoilta, Kavista, Yleltä, Lahden Videokuvaajilta, Skipparin arkistoista sekä lahtelaisilta alan harrastajilta. Filmissä mukana on ollut iso joukko lahtelaisia ja paljon tuttuja vilahtaa myös kuvissa.*

# Lemmenlatu (Skiŝpuro de amo) – rakonto pri pli ol 110- jara historio de la urbo Lahti

La titolo de la du-hora filmo alludas al la skiŝpuro nomita *Lemmenlatu* en Lahti. Ĝi estis la unua lumigita skiŝpuro en Finnlando.

*Lemmenlatu* estas la plej granda dokumenta filmo iam farita en Lahti (parte dramatigita). *Lemmenlatu* rakontas pri la 110-jara historio de la urbo ek de ĝia fondo en 1905. En ĝi estas pritraktitaj la industriaj kaj komercaj evoluoj, edukado, sporto kun la vintraj *Salpausselkä*-skiludoj, la radiomastoj kaj la multflanka kultura vivo, de teatro al koncertoj kaj muzeoj.

La ideo de la filmo *"Lemmenlatu"* pri la historio de Lahti venis de s-ro *Keijo Skippari*. Li estis akompanata de la reĝisoro *Tertta Saarikko* (vidvino de politikisto *Jouko Skinnari*). Inter la skriptanoj estas la verkisto de detektivaj rakontoj, *Timo Sandberg*.

La filmo farita en Lahti estis produktita de *Päijät-Häme Film-Centro*. Bildmaterialo estis akirita de pluraj fontoj, i.a. de entuziasmuloj pri historio en Lahti. Granda amaso da lahtianoj partprenis en la farado de la filmo kaj multaj konataj homoj ankaŭ videblas en ĝi.




Kuva: www.facebook.com/lemmenlatu

## ”Semajno de enigmoj” – La unua gazeto de enigmoj en Esperanto!




Ĝi enhavas klasikajn krucvortenigmojn, kriptan kaj silaban krucvortenigmojn, vortoserĉon, rebuson, aliajn vortopuzlojn, novaĵojn, kaj ceteraĵojn.

Ĉefredaktoro de Semajno de Enigmoj estas *Giorgio Denti*, ankaŭ prezidanto de Roma Esperanto-Grupo.

Abono estas SENPAGA. La aktualaj numeroj estas dissendataj retpoŝte al la abonantoj.

Detaloj ĉe la retejo:
*www.semajnodeenigmoj.com/informo_2.html*

*Ret-Info / Lingvo-Studio, LS*
*www.eventoj.hu*

## Nova versio de PMEG lanĉita




Ĵus publikiĝis nova versio de *PMEG* - la Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko.

La nova versio havas la numeron 15.0.2. Ĝi estas plua ŝtupo cele al dua eldono kiel papera libro. La aŭtoro, akademiano *Bertil Wennergren*, faris ankoraŭ multajn korektojn, kompletigojn kaj ĝisdatigojn, sed plu restas multo por fari. PMEG 15.0.2 haveblas ankaŭ en elŝutebla formo kiel HTMLkaj kiel PDF: *bertilow.com/pmeg/*

*EKo 15 de UEA*



Meze de majo, en bela somera vetero, vizitis *KKS Clay Magalhães* duan fojon en Lahti. Kune kun la oficistoj de turisma organizo *Lahti Region* kaj kelkaj estraranoj de EAF li konatiĝis kun la kongresejo *Isku Areena* kaj aliaj lokoj de la estonta kongresurbo. Jen Clay kun aliaj en *Isku Areena*.

# Nova babilejo por finnlandanoj

## Diskutoforumo kaj kurso por kongresanoj en UK en Lahti 2019

*Kun kuulin, että maailmankongressi järjestetään vuonna 2019 Lahdessa, mieleeni juolahti heti kysymys, minkälaisia suomen pikakursseja internetissä heille on tarjolla. Lahdessa kun tuskin pärjää pelkällä esperantolla. Googlasin ja kävi ilmi, että Ylen tarjonnan lisäksi ei oikein ole muita. Päätin luoda verkkokurssin.*

*Myöhemmin havaitsin, ettei suomalaisessa esperantoskenessä oikein ole foorumia yleiseen keskusteluun. Suomen Esperantoliiton sivuilla ei sellaista ole eikä sinne sellaista haluttu. Yahoossa oleva EAF-agadas on tarkoitettu liiton viestintään. Lernussa suomenkielinen keskustelu häviää kaiken muun joukkoon, minkä lisäksi sen käytettävyys ei ole parhaimmasta päästä jne. Päätin näin ollen luoda myös keskustelufoorumin.*

*Näin syntyi idea webbipalvelusta, johon tulisi kaksi osaa:*

- *keskustelufoorumi*
- *suomen kielen kurssi*

*Keskustelufoorumin tarkoituksena on tarjota kaikille avoin foorumi keskustella, kysyä mistä tahansa esperantoon liittyvästä tai sitä sivuavasta aiheesta. Eli katto korkealla, seinät leveällä. Foorumin yhteydessä voisivat halukkaat myös pitää ”miniblogia” ja sinne voisi koota yhdistysten tapahtumakalentereita.*

*Suomen kielen kurssin kohderyhmänä olisivat ensi vuoden maailmankongressiin tulevat osallistujat. Opetuskielenä toimisi siis esperanto.*

*Julkistin ensimmäisen osan, keskustelufoorumin, Lahden kesäkurssin lopuksi. Finna babilejon (https://finnababilejo.fi) perustoiminnot ovat kaikki käytettävissä:*

- *keskustelufoorumit*
- *miniblogit*
- *tapahtumakalenterit*

*Keskustelufoorumin luonteeseen kuuluu, ettei se toivottavasti ole koskaan ”valmis”. Pikemmin jokainen keskustelu, kysymys on askel eteenpäin.*

*Suomen kielen kurssin runko on olemassa ja noin puolet oppitunneista on luotu, mutta paljon on vielä kesken. Tavoitteeni on julkaista se alkusyksystä, mutta aikatauluun vaikuttaa, kuinka hyvin saan avustajia puhenäytteisiin, oikolukemaan, testaamaan jne.*

*Sivuston tarkoituksena ei ole korvata yhdistysten omia sivustoja, vaan tarjota helposti löydettävissä oleva portaali, auttaa ja ohjata tulevia ja olevia suomalaisia esperantisteja eteenpäin.*

*Olet tervetullut keskustelemaan, kyselemään, vastaamaan ja pitämään omaa esperantoblogiasi. Jos kuulut johonkin yhdistykseen, jolla on tapahtumakalenteri tai yhdistyksesi haluaa sellaisen, sellainen voidaan laittaa Finna babilejoon. Ota yhteyttä ja kerro, mitä sinä haluat sinne.*

Kiam mi eksciis pri la UK en Lahti 2019, mi ekpensis, ĉu ekzistas retaj kursoj por lerni la finnan. Mi trovis, ke ne ekzistas taŭga materialo por esperantistoj. Do mi decidis krei mian propran retan kurson.

Poste mi ankaŭ rimarkis, ke en la finna esperantujo ne estas forumo por ĝenerala diskutado. Do mi decidis krei ankaŭ tian kaj kombini ĉi tiujn du en unu retan servon:

- diskutoforumo
- kurso de la finna

La diskutoforumo celas esti facile alproksimiĝebla por ĉiuj diskuti, demandi pri io ajn, kio iel temas pri Esperanto en Finnlando. Plue en la diskutoforumo tiuj kiuj deziras povus havi miniblogon kaj asocioj povus publikigi siajn eventokalendarojn.

La finna kurso estus celita al partoprenantoj de UK en Lahti venontjare. Do, la lernolingvo estas Esperanto.

Mi publikigis la unuan parton, diskutoforumon, dum la somera kurso en Lahti.

La bazaj funkcioj de Finna babilejo (*https://finnababilejo.fi*) jam estas pretaj:

- diskutoforumo
- miniblogoj
- eventokalendaroj

Tia forumo espereble estas neniam ”preta”. Kontraŭe ĉiu skribado, ĉiu demando, ĉiu respondo estas unu paŝo sur la vojaĝo.

Skeleto por la finna kurso jam ekzistas kaj ĉirkaŭ la duono de la lecionoj estas pretaj, sed ankoraŭ restas multe da laboro. Limdato estas iam en la komenco de aŭtuno, sed multe dependas de tio, kiel mi trovas volontulojn por prononci, pruviĝi, testi ktp.

La retejo ne celas anstataŭi retejojn de asocioj, sed oferti portalon, kiu helpas al venontaj kaj nuntempaj finnaj esperantistoj antaŭen.

Vi estas bonvena diskuti, demandi kaj respondi aŭ havi propran miniblogon.

*Juha Metsäkallas*
*Turku (estrarmembro de EST)*

# La internacia verkista konferenco de Lahti

Literaturo estas ankaŭ en malgranda lando kiel Finnlando ĝardeno de disbranĉiĝantaj padoj donanta kreskejon al kulturo tiel spirita kiel ekonomia kiel hobia. Sen profesiaj verkistoj kaj ilia kunlaboro tiel hejmlande kiel internacie la institucio literaturo tamen fariĝus ŝrumpa vakuo, kie kreskantaj branĉopintoj serpentus palaj en mallumo kvazaŭ ĝermoj el terpomoj forgesitaj en kelo.

Tio kaj la aparteco de la geopolitika stato de Finnlando naskis la ideon pri internacia verkista konferenco en *Mukkula* en *Lahti*, kaj ekde 1963 *www.liwre.fi* estas okazigata ĉiun duan jaron. La nekomercan, al publiko senpagan eventon financas la ministerio pri edukado kaj kulturo kaj la urbo Lahti, en kies kultura krono la konferenco brilas kiel la plej valora juvelo.

La verkista konferenco estas la soklo de internaciiĝo de la Finnlanda literaturo, ĝia roka fundamento. Dum la malvarma milito ĝi ankaŭ ofertis unikan forumon al verkistoj el oriento kaj okcidento renkonti unuj la aliajn kaj serĉi vojojn renkonti defiojn de verkisteco. Malgraŭ sia juna historio de iom pli ol kvindek jaroj ĝi evidente estas la plej malnova regule okazanta verkista kunveno en Eŭropo.

La organizanto respondeca pri la enhavo kaj verkistaj rilatoj de la konferenco estas *Eino Leino –seura*, Societo pri *Eino Leino* (”la” finna poeto, 1878–1926).

*Juhani Lindholm*
*Verkista Asocio de Finnlando,*

# Malgranda kunveno en Iittala

Pienestä esperantotilaisuudestamme Iittalassa näyttää tulevan perinne. Toukokuun kokouksessa meillä oli yllätys! Kokoukseen osallistui puhelimitse Jorma Ahomäki Turusta. Keskustelumme kaiutettiin Iittalan kirjaston kabinettiin. Olin aiemmin sopinut Jorman kanssa: -”Sitten puhutaan vain esperantoa!”

Jorman hienosti artikuloima kaunis esperanto oli läsnäolijoiden mielestä helposti ymmärrettävää ja kiehtovaa. Jorma kertoi pyynnöstäni omasta esperantotaustastaan.

Mietin ”puhelinyllätysvierasta” seuraavaan tapaamiseemme. Onko ehdotusta?

*Terveisin*
*Markku Iittalasta.*

# Silja Kivekäs
## 1933–2018




Al la memoro de Estimata Esperanto-instruisto *Silja Kivekäs*. Profesie Silja instruis lingvojn en gimnazio *Kannas* en Lahti. De *Mia Alikoski* ŝi lernis la internacian lingvon kaj komencis post Mia mem instrui ĝin en la popolaltlernejo de Lahti. Silja instruis Esperanton ankaŭ en lernejoj kaj invitis gelernantojn, kiuj ne bone povis lerni aliajn lingvojn studi tiun lingvon kaj tiel trovi fadenon al lingvolernado ĝenerale. Mi mem konstatis, ke almenaŭ du lahtiaj gelernantoj tiel sukcesis lerni ankaŭ aliajn lingvojn.

Silja Kivekäs tradukis kaj adaptis por finnoj la lernolibron *Jen nia mondo I–II* de *John Wells* kaj aperigis ĝin kun kasedoj proprakoste. Post Mia Alikoski ŝi estis la prezidanto de Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj (ELFI) dum la jaroj 1986–1994.

Ŝi organizis esperantokaravanojn almenaŭ al la UK-oj en Brajtono kaj Vieno, kie mi estis ŝia kunĉambranino. Ŝi instigis min kaj verŝajne ankaŭ *Anna Ritamäki* fari lingvoekzamenon de UEA en Vieno. Somerajn esperantokursojn en *Metsäkartano* ŝi organizis almenaŭ dufoje kun eksterlandaj instruistoj kaj partoprenantoj. Antaŭ la UK en Tampereo Silja kun aliaj membroj de ELFI kaj klubanoj de Lahti-klubo partoprenis en organizado de trejnkursoj en popolaltlernejo de *Harjula* en Lahti.

Pro la familiaj kaj profesiaj aferoj ŝi lasis la estraron de ELFI fine de la 1990-aj jaroj kaj post tio tre malofte povis partopreni kluban vivon en Lahti. Post la pensiuliĝo ŝi pasigis tempon en la somera dometo, kiun ŝi rekonstruigis dum lastaj laborjaroj. Dum lastaj dudek jaroj mi ne plu vidis ŝin, sed de iu konatulino mi iam aŭdis, ke ŝi malsanis kaj ne plu interesiĝis pri esperantaj aferoj same kiel pli frue.

Mi estas dankema al Silja, ĉar sen ŝia instruado mi ne lernus Esperanton kaj ne trovus Esperantomovadon. Estis ĝuste ŝi, kiu instigis min partopreni Vintrajn Tagojn de EAF en *Jyväskylä*, kie *Harri Laine* transdonis la martelon al *Jukka Laaksonen*. Silja ne tre ŝatis, kiam mi diris, ke mi estas ŝia disĉiplino, kiam mi dum iu el la esperantovojaĝoj de *Sigrid Kivistö* tiel prezentis min al lokaj esperantistoj. Iam ŝi diris, ke plej bona afero en esperantovivo estas la komunaj vojaĝoj al interesaj lokoj.

*Synnöve Mynttinen*
*sekretario de ELFI dum*
*la periodo de Silja Kivekäs*

Saimme suruviestin huhtikuun lopulla. Silja Kivekäs menehtyi vaikeaan sairauteen 21.4.2018. Hän oli syntynyt 8.1.1933 Hausjärvellä ja suoritti elämäntyönsä Lahdessa kieltenopettajana. Esperantistit oppivat tuntemaan hänet *Jen Nia Mondo* -oppikirjan tekijänä. Kirja on edelleen esperanton harrastajien käytössä. Työtoverit ja ystävät muistavat Siljan valoisana ja empaattisena ihmisenä.

*Helli Jalas*
*lahtelainen esperanton opiskelija*
*ja kollega*

# Suomen Esperantoliiton jäsenjärjestöt

**Muutokset ja lisäykset tälle sivulle: Esperantolehti/EAF, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, s-posti *eafgazeto@esperanto.fi*.**

Suomen Esperantoliiton paikallis- ja jäsenjärjestöt:

- Helsingin Esperantoseura / Esperanto-klubo de Helsinki, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. 💻 *www.esperanto.fi/helsinki jukka.pietilainen@helsinki.fi* (Jukka Pietiläinen)
- Iisalmen Esperantoklubi / Esperantoklubo de Iisalmi, (Onni Kauppinen) Uudispihantie 298, 74100 Iisalmi. ☎ 0500 813 530 💻 *onni.kuappinen@gmail.com*
- Jyväskylän Esperantokerho / Esperantoklubo de Jyväskylä (Kimmo Hannula) Esperantoklubo de Jyväskylä, c/o Kettunen, Keihäsmiehenkatu 3, 40630 Jyväskylä. ☎ 044 953 4454 💻 *kimmo.hannula@creavit.fi*, *www.esperanto.fi/jyvaskyla*
- Oulun esperantoseura / Esperanto-societo de Oulu ry (Aini Vääräniemi), Vääräjärventie 26 A, 93590 Vanhala 💻 *www.esperanto.fi/oulu aini.esp@hotmail.com*
- Esperantoseura Antaŭen r.y. / Esperanto-societo Antaŭen, Satakunnankatu 30 C 6, 33210 Tampere 💻 *www.esperanto.fi/grupoj/tampere (Tapani Aarne: tapani.aarne@mbnet.fi* ☎ 050 5245 823)
- Turun Esperanto-yhdistys ry. / Esperanto-societo en Turku (Tiina Oittinen), Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. 💻 *www.esperanto.fi/grupoj/turku* 💻 *tiina.oittinen@pp.inet.fi* ☎ 050 549 4709
- Suomen opettajien esperantoyhdistys / Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj, (Sylvia Hämäläinen) F. E. Sillanpään katu 2 C 46, 33230 Tampere. 💻 *sylvia.h@kolumbus.fi* ☎ 050 321 4313. Tilinro: FI08 4450 2320 0836 06 ITELFIHH (445023-283606)
- Näkövammaisten esperantoyhdistys Steleto. (Ritva Sabelli) Pietarinkatu 10 D 27, 00140 Helsinki. *http://www.steleto.fi/* 🖷 (09) 660 651 💻 *steleto@pp.inet.fi*
- Suomen nuorten Esperantoliitto / Finnlanda Esperantista Junulara Organizo (FEJO) Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. 💻 *fejo@esperanto.fi*. Tilinro: FI83 5630 0020 2136 06 OKOYFIHH (563000-2213606)

Jäsenyhdistysten jäsenet ovat automaattisesti Suomen Esperantoliiton jäseniä, yhdistykset hoitavat jäsenmaksut liittoon. Esperantolehden hinta jäsenille on 16 € tilattuna jäsenjärjestöjen kautta. Liittoon voi myös kuulua henkilöjäsenenä, jolloin jäsenmaksu on 22 € sisältäen Esperantolehden. Nino Runeberg -seuran jäsenmaksu on 44 €. Lisätietoja jäsenyhdistyksiltä ja liiton toimihenkilöiltä.

Lahdessa on esperantoharrastajien ryhmä, joka kokoontuu tarpeen mukaan. Lisätietoja saa Börje Erikssonilta (EAF:n hallituksen jäsen). 💻 *bovoeo73@gmail.com*.

Esperanton harrastajia on myös mm. Hämeenlinnassa, Hyvinkäällä, Maarianhaminassa, Porissa, Raumalla, Salossa ja Taivalkoskella.

Paikkakuntien yhteyshenkilöistä saa tietoa Suomen Esperantoliitolta, ks. hallituksen yhteystiedot sivulla 2.

## ESPERANTOLEHTI

**ilmestyy vuonna aperas dum la jaro 2018**

| Nro | Limdato | Aperas |
|---|---|---|
| 4/2018 | 1.9. | en septembro |
| 5/2018 | 15.11. | en decembro |

### Ilmoitushinnat ◆ Anoncprezoj

| Ulkopuoliset mainostajat / Ekster membraro: | Jäsenet / Membroj: |
|---|---|
| 1/1 sivu/paĝo 100 € | 1/1 sivu/paĝo 50 € |
| 1/2 sivu/paĝo 60 € | 1/2 sivua/paĝo 30 € |
| 1/4 sivu/paĝo 40 € | 1/4 sivua/paĝo 20 € |

Sendu la anoncojn aŭ rete al la redaktejo: *eafgazeto@esperanto.fi* aŭ poŝte al la oficejo: Esperantolehti/EAF, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki.

LHT
Posti Oy
Posti Green

# Kiel enmovadigi la Esperanto-lernantojn de Duolingo?



Pli ol 1,7 milionoj da homoj eklernis Esperanton per *Duolingo*. Sed kie estas tiuj lernantoj? Multaj el ili eble rezignas pri la lernado pro multaj kaŭzoj, interalie, ĉar ili ne sukcesis starigi personan kontakton kaj amikecan rilaton kun esperantistoj en siaj loĝurboj.

Pro tio UEA fariĝis partnero de Duolingvo. UEA helpos trovi evento-gastigantojn, kiuj jam bone konas Esperanton, kaj Duolingo prizorgos invitojn al tiaj lokaj eventoj por lernantoj, kiuj iom progresis en la Esperanto-kurso.

Gastigantoj estas volontuloj, kiuj organizas interesajn, agrablajn eventojn, kie Esperanto-lernantoj de ĉiuj niveloj lernas kaj amuziĝas kune. La eventoj povas esti diversspecaj, ekzemple babiladaj rondoj, studgrupoj, ludaj aŭ muzikaj renkontiĝoj en via loka klubo aŭ kafejoj, aŭ promenadoj en urboj aŭ en naturo.

Ni jam komencis traduki la evento-retejon de Duolingo al Esperanto, por ke ĉiuj esperantistoj povu gastigi eventojn, diskonigi ilin per Duolingo kaj akcepti novajn lernantojn. En ĉi tiu unua, prova fazo ni precipe serĉas volontulojn, kiuj krom Esperanto regas la anglan aŭ la hispanan, la du nunajn kurslingvojn.

Se allogas vin la ideo organizi eventojn kaj gastigi novajn Esperanto-lernantojn per Duolingo, bonvolu kontakti *Emilio Cid: cid.emilio@gmail.com*

*GK 737 de UEA*

## Seuraava numero ◆ Venonta numero

Seuraava numero ilmestyy syyskuussa. Aineisto 1.9.2018 mennessä toimitukseen. La venonta numero aperos en septembro. Artikoloj ĝis 1.9.2018 al la redakcio. Osoite/adreso: Esperantolehti/EAF, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, s-posti/rete: <eafgazeto@esperanto.fi>.

Kopio Niini, Tampere 2018